# AGEI raporto 2008

Statuto: Nova statuto estis akceptita kaj prezentita al la juĝejo. Jura enskribo de la asocio okazis en Hannover, 01.02.2008. AGEI estas daŭre jure memstara kaj ricevis agnoskon pri komunutileco.

ESTRARO: prezidanto: Zsofia Korody
vicprezidanto: d-ro Rudolf Fischer
kasisto, membroadministranto: Christof Krick
estrarano: Harald Schmitz
kasrevizoroj: Wolfgang Bohr, Karin Klose

Membraro: la nombro de membroj restis stabila, kun ĉ. 90 membroj dum 2008 la plej granda landa sekcio de ILEI. AGEI-estraro kaj komitatanoj esprimis sian malkontenton pro la kontraŭstatuta funkciado de ILEI, pro la neglektita, neregula raportado pri ILEI-buĝeto, financoj al la kotizpagantaj landaj asocioj.

Agado
Instruado:  partopreno en la internacia laboro lanĉita de la laborgrupo 'Lingvolanĉilo'
Laŭ la kolektitaj informoj E-instruado estas en 15 lernejoj: en elementa nivelo 6, en meza 6, en supera 3. La plej multnombra grupo lernis en la bazlernejo de Günne: 50 infanoj.
AGEI donas organizajn, metodikajn konsilojn kaj helpas per instrumaterialoj, instruhelpiloj al tiuj gekolegoj, lernejoj, kiuj tion bezonas, petas.

Lerneja projekto 2008-2010
Gajnita Comenius-projekto por 3 bazlernejoj (jaraĝo 8-12): Springboard lernejo en Bar Hill/ Cambridge, Britio, Herzberg am Harz, Germanio kaj Miskolc, Hungario. La celo estas interkultura edukado, lernado per muziko, instruado de Esperanto kiel lernfaciliga studobjekto. Okazas reciprokaj vizitoj kun gepatroj.

Junulara laboro
Kunlaboro kun Germana Esperanto-Junularo (GEJ), ekz. helpo ĉe lerneja instruado (Günne), prizorgado de infanoj dum somera renkontiĝo en Pollando, partopreno de gejunuloj en pedagogiaj tagoj, klerigkursoj

Klerigado, pluklerigado
en kunlboro kun Germana Esperanto-Asocio (GEA): kunordigante farendaĵojn kun Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg okazas klerigsesioj, seminarioj dum la tuta jaro. Celo: trejni novajn E-instruantojn, zorgi pri ilia kvalifikado, lingva-faka spertiĝo, doni pluklerigeblon al gekolegoj, oferti seminariojn, fakprelegojn. En 2008 la ĉeftemoj estis interlingvistiko (Detlev Blanke), literaturo, informado, varbado, gramatiko, metodiko.

Renkontiĝoj:
La plej gravaj kunvenoj estis la
- jarĉefkunveno de AGEI dum la tradicia, ĉiu-jara Germana Esperanto-Kongreso (GEK, majo 2008 en Essen)
- TORPEDO-4 (Tutlanada Oktobra Renkonto Pedagogia) 02-05.10.2008 en Herzberg am Harz.  Faka renkontiĝo, spertinterŝanĝo.

Ĉeftemoj:
1. Cseh-metodo kaj aliaj metodoj por efika E-instruado. Invititoj: Sabine Trenner, Zlatko Tisljar, Stefan MacGill.
2. Esperanto-instrumaterialoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (Rudolf Fischer)
3. Esperanto en la lernejo kaj lernejaj projektoj (Zsofia Korody)
- partopreno en la laborkunveno de delegitoj de Federaci-landaj Esperanto-Ligoj (novembro 2008): kunordigo de agado, jarplanado, komunaj aktivecoj
- partopreno en Tago de Lernejo dum UK, (maleblis partopreno dum ILEI-konferenco en Benino)

Ekzamenoj
kunlaboro kun Germana Esperanto-Instituto kaj UEA. En decembro 2008 okazis trejnado de ekzamenontoj por la novaj UEA Origo ekzamenoj (niveloj B1, B2 kaj C1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro) en Herzberg am Harz.

Informado
AGEI membroj ricevas IPR, en ĉiu numero aperis alvokoj aŭ raportoj pri instru-agado en Germanio. Ili ricevas ankaŭ neregulajn cirkulerojn kun alvokoj, novaĵoj, gravaj sciindaĵoj pri en- kaj eksterlandaj instru-rilataj eventoj, ktp. Informkanalo estas ankaŭ Esperanto aktuell, ĉefa organo de GEA.
AGEI ekhavis novan hejmpaĝon ligitan al la hejmapaĝo de GEA
http://esperanto.de/agei